KUSPE. N-ro 11. PRINTEMPO-95.


# KUSPE

"KUSPE" Oficiala informilo de Eŭska Esperanto-Asocio
Euskalerriko Esperanto Alkartearen aldizkaria

# PER FLUGILOJ DE...
# ROKENROLA VENTO.



UTILAJ ADRESOJ →



Kunordiganto. Rafael Blanco.
Larrainbide 3,3. ezk.
E-31800. ALTSASU.

ELDONAS: EUSKA ESPERANTO ASOCIO.
ZAPATERIA 29.
E-01001. VITORIA-GASTEIZ.

SALUT VORTOJ ↓

Post ne tro frosta vintro kaprica printempo trafas nin per tradiciaj okupoj: ekzamenpreparoj, eksteren-invito, vilaĝfestumado, somerkalendar-rigardo...

Kelkaj membroj de nia asocio serioze prilaboras vojaĝon al S.Peterburgo IJKcele, sed la mono(aŭ la monomanko) ilin malpermesas esti certaj pri la efektivigo de la projekto. Almenaŭ ĝi surstratigis nin kamparan-vestite por kanti la sankta agatajn versojn kaj atingi iom da mono.
Krom tio ili produktas kaj disvendas ledaĵojn kaj ja pretas surloke koni la e-instituciojn, nome, amasloĝejojn, memzorgadon ktp...

Se la lastan numeron mi taksis madjareca, tiu -ĉi glite direktiĝas "Euska Kverko" vojen. J.M. Sarasua, pro troa okupiteco ne povas prepari momente eldonon de nova E.K.
Do, kelkaj artikoloj porEKaj gastos pli modeste ĉe la frato KUSPE.

Aliflanke ni ne povas enflanken lasi la realon kiu nin ĉirkaŭiĝas: daŭrigado de atencoj, apero de kadavroj de Etanoj, minacoj kontraŭ politikistoj kaj ĵurnalistoj...Kiam ekŝajnis ke la paco alproksimiĝas, ĉio akriĝas denove ...
Ni ne perdu la esperon kaj preparu la vojon.

P P P Penu Por Paco

JEN KELKAJ KONTRIBUOJ RICEVITAJ, PARTE REAGE AL LA APUDA ARTIKOLO PUBLIKIGITA EN EŬSKA KVERKO, KIUJN PRO LA ĈESO DE TIU REVUO NI APERIGAS EN KUSPE. SE LEGANTOJ DEZIRAS DAŬRIGI LA DEBATON PRI NACIISMO, ŜOVINISMO, INTERNACIISMO KTP, NI BONVENIGOS NOVAJN OPINIOJN. TAMEN NI PETAS, KE LAŬEBLE ONI EVITU PERSONAJN ALUDOJN AŬ ATAKOJN.

( ARTIKOLO PUBLIKIGITA EN "EŬSKA KVERKO", N-RO 5, PĜ. 20 )

## *Ĝeneralaj demandoj al legantoj*

NIKOLAO GRIŜIN, LATVIO

1.Ĉu vi opinias L. Zamenhof saĝulo aŭ malsaĝulo? Kiel vi rilatas al lia ideo uzi *neŭtralan* lingvon, kiu malebligus diskriminacion laŭ nacieco?

2.Kio estas "ŝtata lingvo"? Ĉu tio ne estas rimedo de la "ŝtata nacio" diskriminacii alinaciulojn?

3.Ĉu rajtas homo uzi tiun lingvon, kiun li opinias plej oportuna por si?

4.Ĉu oni rajtas diskriminacii homon nur pro tio, ke li ne parolas ŝtatan lingvon", aŭ pro tio, ke liaj prauloj iam venis el alia lando?

5.Kio estas naciismo? Ĉu ĝi estas laŭdinda? Ĉu ne estis naciismo kaŭzo de (preskaŭ) ĉiuj militoj? Kiu estas la diferenco inter naciismo kaj patriotismo? Ĉu povas vera esperantisto esti naciisto?

6.Kio estas "kosmopolitismo"? Ĉu ĝi estas mallaŭdinda? Kial?

7.Ĉu vi subtenas unuiĝon de la homaro, ke sur la planedo forestu limoj?

8.Se la homaro unuiĝos, kiu lingvo estu "ŝtata" en la "Terlando"?

9.Ĉu vi aprobus formiĝon de unueca homara nacio?

10.Se la homaro unuiĝos, ĉu vi ne pensas, ke multaj homoj transloĝiĝos kaj ŝanĝos sian lingvon favore al tiu, kiu prezentas pli da eblecoj, rezulte de kio malgrandaj lingvoj iom post iom malaperos? (Ĝuste tia *senperforta* procezo okazis en Sovetunio, kiu estas kvazaŭ modelo de estonta "tutmonda imperio")

11.Ĉu necesas ajna-koste peni konservi ĉiun plej malgrandan lingvon?

12.Ĉu vi opinias akceptinda, ke la homaro ĉiam estu dividita en diversajn naciojn kaj ŝtatojn?

Por mi mem mi jam trovis respondojn, sed mi volus scii opinion de aliaj homoj. Ni, esperantistoj, havas "internan ideon", kiu helpas solvi la ĝeneralajn demandojn. Kaj tiam ni nature venos al ĝusta solvo de ĉiu konkreta nacia problemo.

## PROVO DE RESPONDO

Imperiismo estas tiom perfida doktrino, ke por trompi la homaron, ĝi eĉ taksas necese kaŝi la veron al homoj. Aleksander Zdechlik skribis jenon (EŬSKA KVERKO, n-ro 5, pĝ. 18): "... poloj -krom plenmano da homoj loĝantaj apud la limo- nenion scias pri silezia teritorio en Ĉeĥio. Tio estas bona..." Kiel aliaj doktrinoj, kiuj dronigis la homaron en larmo-maroj, imperiismo sekvas la saman vojon, kiu malheligas la veron.

Kiel en Baltaj Landoj, ankaŭ en Francio loĝas alinaciuloj, sed ili eĉ ne revas altrudi siajn lingvojn al francoj, kiuj neniam akceptus tian maljustaĵon. Kompreneble, ankaŭ Francio altrudas sian lingvon al popoloj iam devige aneksitaj. Ĉar kiel Rusio, ankaŭ ĝi estas imperiisma. Nur inter naciistaj ŝtatoj povas ekzisti frateco, kiel ekzemple inter Ĉeĥio kaj Slovakio, sed ne inter naciista Bosnio kaj imperiisma Serbio, aŭ inter imperiisma Rusio kaj imperiisma Ĉinio ktp.

Nun mi loĝas en Okcitanio, do mi estas okcitano, ĉar mi amas ĉiujn popolojn, ĉiujn lingvojn. Se mi agus alie, mi ne amus Okcitanion, do mi ne amus la tutan homaron, ĉar mi ja malamus PARTON de la homaro.

Griŝin, blindigita de sia interimperiismo, ne sciante kio vere estas internaciismo, ne sciante, ke

internaciismo ne eblas sen naciismo, proponas kelkajn demandojn, kiujn mi provos respondi:

1. Zamenhof estis saĝulo, kiu donis al la homaro E-on por ke ĉiuj homoj interkompreniĝu, sed ne por neniigi la naciajn lingvojn.

2. Ŝtata lingvo celas ne diferencigi la aŭtoktonojn, protekti ilian identecon kaj liberecon.

3. Ĉiu homo rajtas uzi tiun lingvon, kiu plaĉas al li, sed li ne rajtas altrudi ĝin al iu ajn teritorio fremda.

4. Oni rajtas diskriminacii neniun homon pro tio, ke liaj prauloj iam venis el alia popolo, sed fremdulo estas devigata lerni la nacian lingvon de siaj gastigantoj, por ne altrudi la sian al aŭtoktonoj, por ne diskriminacii la naciulojn.

5. Naciismo estas la doktrino defendanta la naciajn rajtojn de ĉiu popolo, sen agresi la aliajn naciojn, ĉar ĝi permesas protekti la pacon. Dume imperiismo estas tute kontraŭa doktrino, kaŭzinta preskaŭ ĉiujn militojn.

Naciismo kaj patriotismo estas amo al iu ajn nacio, sen malami la aliajn. Dume imperiismo estas malamo, eĉ kontraŭ la propra popolo.

Vera esperantisto povas esti ĉu naciisto, ĉu imperiisto, ĉu internaciisto, ĉu inter-imperiisto, ĉu inteligenta, ĉu malinteligenta, eĉ... stulta!

6. Kosmopolitismo estas ĉiam laŭdinda, ĉar ĝi signifas ami ĉiujn popolojn.

7. Dum la homoj ne estos sufiĉe inteligentaj, necesos limoj por protekti sin kontraŭ agresoj. Unuiĝo de la homaro ne estu altrudita, alie ĝi ne estos unuiĝo.

8. Se la homara unuiĝo efektiviĝos, ĉiuj naciaj lingvoj estu ŝtataj en sia nacio. Tutmondaj civitanoj decidu, ĉu E-o fariĝos la federacia lingvo aŭ ne.

9. Mi ne aprobus formiĝon de unueca tutmonda nacio. Tio signifus detruon de granda riĉeco de lingvoj kaj kulturoj, kiu riĉeco apartenas al la tuta homaro.

10. Homoj kiuj translokiĝas estu devigataj alpreni la lingvon de siaj gastigantoj. Alie enmigrantoj aŭ invadantoj altrudus la siajn al aŭtoktonoj.

Grandaj aŭ malgrandaj lingvoj neniam malaperas, se ne estas per ukazoj de invadantoj.

Sovetunio estis masko-vesto de la Rusa Imperio, kiu uzis kaj misuzis perforton kontraŭ ĉio. Ĝi estis modelo de *fia* tutmonda imperio. Sed ni, civilizitaj homoj, celas tuntmondan fratecon.

11. Ĉiuj lingvoj rajtas esti konservataj, eĉ la plej sensignifaj. Ni ĉiuj responsas fronte al estonteco.

12. Estas dezirende, ke la homaro unuiĝu koservante la diversajn naciojn. Vera unio povas atingiĝi nur respektante diversecon.

Mi aldonas, ke Griŝin -ĉu konscie, ĉu senkonscie- estas bedaŭrinde, kiaj aliaj, efika malamiko de E-o, ĉar li prezentas ĝin lingvo malamika de la nacioj, ogra lingvo. Kiel do ni varbos adeptojn al nia internacia lingvo kun tiom granda sabotado?

**Rafael Margalef**
**Okcitanio**

## ĈU NI IRU AL KULTURA DEZERTO?

Lastatempe en pluraj nacilingvaj kaj E-eldonaĵoj aperis diversaj opinioj pri nuna politika, ekonomia kaj kultura situacio en la mondo. La aŭtoroj ofte manipulas per falsaj faktoj pri la vivo en Litovio, Estonio kaj Latvio. Laŭ iliaj artikoloj estas klare videble, ke ili mem neniam vizitis la supre menciitajn landojn kaj eluzis dubindajn inform-fontojn. Kompreneble, ĉiu homo rajtas eldiri propran opinion, sed ni tamen devas obei leĝojn,

sociajn kaj etikajn normojn. Antaŭ ol skribi artikolojn pri koncerna temo oni devas ĝin serioze trastudi laŭ diversaj vidpunktoj.

Unu el la plej gravaj demandoj estas la lingvo-problemo en landoj, kie pro diversaj historiaj kaŭzoj, loĝas dekoj da minoritatoj kontraŭantaj enkondukon de la ŝtata lingvo. Ĉi tie ne temas pri volo, aŭ ne volo, de latvoj, estonoj, litovoj kaj eŭskoj paroli ruse, pole, germane, hispane, sed pri normala solvo de lingvo-problemo en lando, por eviti amason da superflua papero kaj granda elspezo por tradukado. Oni devas ne forgesi la rajton de indigenoj, por kiuj la ŝtato estas la sola loko por evoluigi siajn lingvojn kaj kulturojn. Tamen, ofte, aŭtoroj forgesas mencii tiun ĉi faktoron en siaj artikoloj, aŭ ĉirkaŭiras tiun problemon.

En Latvio estas eblecoj lerni diversnaciajn lingvojn en kursoj. Infanoj de minoritatoj povas lerni en nacilingvaj lernejoj kaj klasoj. Pasint-jare en urbo Daugavpils estis malfermita klaso por germanaj infanoj: ili estas 26 kaj lernas en sia gepatra lingvo. Kaj jam kvin jarojn funkcias en Daugavpils lernejo por polaj infanoj, kie lernas 2228 infanoj. En urbo Ventspils funkcias klasoj por ciganoj kaj antaŭ nelonge eldoniĝis en Latvio cigana aboco-libro. En ĉiu urbo aŭ provinco funkcias lernejoj kaj klasoj por alinaciuloj. Nur de ili mem dependas, kiamaniere ili scipovos gardi siajn naciecon kaj kulturon ekster sia etna lando.

Kelkaj personoj defendas kaj propagandas kosmopolitajn ideojn, kaj la tutan mondon taksas kiel sian patrujon. La ideo estas eble bona kaj humana, sen antaŭjuĝoj kontraŭ iu ajn raso aŭ popolo; sed mond-civitanoj mem povas renkonti malfacilaĵojn migrante tra landoj, ĉar ne ĉie ili povos ricevi ŝatatan laboron kaj bonan loĝejon aŭ venki la lingvo-baron. La afero tiel komplikas, ke ĉiu homo devas ĝin solvi individue, estante preta akcepti malfacilaĵojn. Laŭ sperto, ofte regas opinio, ke migrantaj homoj ne estas patriotoj de sia nova hejm-loko, tial ke ili estis akceptitaj kun suspekto. Formigranta homo perdas ligon kun siaj lando, popolo kaj kulturo.

En artikoloj tre ofte aperas debatoj pri "naciismo", kiu estas traktata negative, malgraŭ la fakto, ke nacio (latine *natio* = popolo) estas unu el la historiaj formoj de homa komunumo kun komunaj lingvo, viv-maniero, religio, kulturo, ekonomiaj kaj politikaj interesoj ktp. Kelkiuj eĉ eldiras opinion, ke naciismo kaŭzas militojn, sed samtempe silentas pri la danĝero de ŝovinismo, kiu laŭ PIV estas "fanatika troa patriotismo, konfuzanta amon al patrolando kun malamo kaj atakemo al aliaj landoj".

Do "naciismo" kaj "ŝovinismo" tre diferencas: la lasta estas danĝera por la homaro, ĉar ĝi kondukas al militoj kaj sklavigoj de aliaj popoloj. Ĉu ne estas ŝovinisme demandi: "Ĉu necesas ajnakoste peni konservi ĉiun plej malgrandan lingvon?".

Same absurde estas prezenti modelon de iama Sovetunio kiel modelon por estonta "Tutmonda Imperio", des pli ke la tuta moda scias pri la kruelaĵoj, pereigo de lingvoj kaj popoloj kaj neniigo de iu ajn nacia esprimo en tiu lando. Ĉu ni volas mondon enuan, grizan, dezertan - sen multkoloreco de popola arto kaj belsoneco de mondaj lingvoj? Certe D-ro L. Zamenhof ne revis pri tia mondo.

Ni daŭrigu kaj efektivigu la revon de nia Majstro, ke E-o fariĝu la dua lingvo por ĉiu homo kaj ponto por normaligo de homaj inter-rilatoj, konservante la egalrajtecon de ĉiu etno.

**Saulcerite Neilande**
**Latvio**

## ĈU EKZISTU MALGRANDAJ NACIOJ?

"Ĉu necesas ajna-koste peni konservi ĉiun plej malgrandan lingvon?", demandas Nikolao Griŝin. Ĝi rilatas al artikolo de s-ino Saulcerite Neilande el Latvio, kiun legi mi, bedaŭrinde, ne havis okazon. Tamen, kiom mi komprenas, ŝia kontribuo estas diktita de ŝia angoro pro estonta sorto de ŝia, evidente amata, nacio. Mi komprenas unue la zorgon pri ŝia malgranda nacio, due la danĝeron, kiun prezentas ankaŭ nuntempe la imperiemo de Rusio kaj de pluraj rusoj -inkluzive de tiuj, kiuj inundis Latvion sub la stalina knuto.

Nikolao Griŝin -nomo iel konata al mi- diras, ke li estas ruso kaj ke li, eble senkonscie, ne liberiĝis de ankoraŭ ne mortinta grand-rusianismo, kiu lastatempe montriĝas oficiale per la rusa emo plu mentori kaj certagrade kontroli la baltajn kaj mezeŭropajn landojn. Griŝin vualas sin per zamenhofaĵoj, sed en la supre citita demando kaŝitas la "diabla hufo" de lia sugesto. Li, implicite, miras, kial latvoj ne tro kredas la rusojn, post la pasintaj plagoj. Jes, miaopinie latvoj klopodas preventi iun eventualan -laŭ latvoj timatan- ripeton de plua plago flanke de grand-rusianismo.

Sen propra, eĉ se malgranda, lingvo -kiun s-ro Griŝin kredas nenecesa-, ne ekzistas nacio. Laŭ li, implicite, ne necesus la ekzisto de la latva lingvo, kaj logike ankaŭ ne de la ĉeĥa, eŭska, slovaka... Kaj rusoj en Latvio povus estis la "kvina kolono".

Laŭ N. Griŝin estas superflua, ne utila la ekzisto de ia eŭska lingvo. Jen ideo tute nekoincida kun la idealo de Zamenhof, kiun Griŝin aŭdacas referenci. Tiu ideo efikas je mi ekscite, ĉar ĝi celas prosperigi la "grandajn" lingvojn aŭ naciojn. S-ro Griŝin ne estas la unua, kiu antaŭmetas tiun ideon. Ĝia aŭtoro propre estas kamarado Stalin en tezoj pri marksima lingvo-scienco, kiuj tezoj estis, post la milito, devige brodkastitaj en la Esperanto-elsendoj de Radio Prago (1945-1950).

**Jaroslav Marik**
**Ĉeĥio**

## ŜOVINISMO ENGLUTAS LA MALGRANDAJN

Legante demandaron de Nikolao Griŝin, mi demandas: ĉu vere N. G. disponas la tutan veron pri estonteco kaj sorto de diversaj popoloj? Ĉu vere esperantisto N. G. ne hontas antaŭ L. L. Zamenhof esprimante tiun ĉi demagogion? Demandaro de N. G. estas kvazaŭ kaĉo miksita kun supo, artefarita kaj tendenca. Kelkaj demandoj estas eĉ retorikaj kaj naivaj. Interese, kiuj estas la plej malgrandaj lingvoj, kies ekzistado estas senvalora. Kion diras pri tio finnoj, estonoj, latvoj, litovoj, nederlandanoj, danoj, norvegoj, eŭskoj kaj aliaj?

N. G. mensogas ankaŭ skribante, ke procezo de malapero de malgrandaj lingvoj okazis en Sovetio senperforte. Ni ĉiuj eks-sovetanoj kaj ankaŭ N. G. mem scias bone, ke en la totalisma reĝimo de iama Sovetunio ĉio okazis perforte, inkluzive de alinaciigo de minoritataj popoloj. Dum duonjarcento perdiĝis ĉ. kvindek etnoj, sed tiu daŭro evidentiĝis nesufiĉa por pereigi ĉiujn etno-naciojn: plu vivas ankoraŭ latvoj, litovoj kaj estonoj.

N. G. forgesis diri, ke minoritata lingvo en Latvio estas efektive la latva lingvo, ke plejparto de la lernejoj estas rusaj, ke ĉiu ruso povas ĉie paroli ruse. Oficiala esprimo "ŝtata lingvo" atentigas pri tio, ke en Latvio, kiel memstara libera ŝtato.

validas ankaŭ lingvo de pranacio. Tute natura afero, ĉu ne?

N. G. ne konas, bedaŭrinde, la signifon de la vorto "naciismo". Laŭ mia opinio naciismo estas normale sana kaj memkomprenebla sento kaj sinteno de la homo, kiu apartenas al iu nacio. Mi, kiel estonino, amas mian patrolandon kaj estas do patriota. Samtempe mi esta esperantisto, ŝajne pli vera ol N. G., ĉar mi ne ofendas aliajn naciojn kaj ne destinas perdiĝon al ili.

Certe, ke kosmopolitismo estas mallaŭdinda. Kosmopolito agas ĉiam egoisme, laŭ la latina proverbo *ubi bene, ibi patria.* Laŭ tiu ĉi slogano rusoj migris dum soveta tempo al vastaj regionoj de la lando, serĉante pli bonajn lokojn kaj vivkondiĉojn. Tiel ili fariĝis homoj senpatriaj. Nun ili estas eksterlandanoj en fremda lando, ofte ili ne kapablas determini sian identecon kaj nun psike suferas pro tio. Sed ne akuzu pro tio aliajn naciojn. Vi mem kulpas.

Retorikaj demandoj ordinare ne valoras respondojn. Tamen mi diros ion pri ŝtataj limoj. Por ni, Baltaj Landoj, estas nia orienta limo tre necesa. Ni devas plifirmigi ĝin kontraŭ atakontoj kaj konkerontoj. Rusio ne montriĝas al ni kiel fidinda najbaro. Samtempe nia okcidenta limo estas nun libera: al amikoj ni ĉiam esta malfermitaj.

Kiel N. G. imagas unuiĝon de la homaro? Ĉu unu lingvo kaj unu nacio? Li ja ne ĝuste komprenis la vidpunktojn de L. L. Zamenhof, kiu neniam intencis neniigi la riĉecon de nacioj kaj lingvoj. Li neniam volis, ke E-o fariĝu la unusola lingvo en la mondo. Zamenhof estis pli modesta kaj ne tiel naiva. Komprenеble, idealismo estas unu karaktera trajto de la zamenhofa koncepto, sed tio estas bona idealismo, kiu ne faras malbonon al aliaj. Sed vi, N. G., penas eluzi liajn vidpunktojn por kaŝi kaj ŝirmi viajn grand-ŝovinismajn ambiciojn. Sub la ombrelo de la "interna ideo" vi ne subfosu ŝtatecon de Latvio, kaj ne semu malfidon inter diversaj nacioj kaj popoloj.

Ankaŭ malgrandaj nacioj rajtas ekzisti, ankaŭ malgrandaj lingvoj estas valoraj jam ekde la tempo de la Babela Turo. Se vi intencas ankaŭ estontece vivi en Latvio, estus rekomendinde al vi integriĝi en la latvan socion kaj ne plu fuŝi rilatojn inter pranacianoj kaj enmigrintoj-koloniistoj.

**Heljn Viires**
**Estonio**

# ATENTU!

Pro troa okupiteco de la redaktoro, la revuo EŬSKA KVERKO devas ĉesi por kelka tempo. Dume, kaj ĝis ĝi ree publikiĝos (ĉu post longe?), ĉiu abonanto ricevos KUSPE, la organon de Eŭska Esperanto-Asocio. Se vi (re)pagis vian kotizon antaŭ nelonge kaj deziras la redonon de via mono, vi povas tion peti al la redaktejo de EK.

# 38a IS-VORTARETO


Rafael Blanco

1. ETOSO: sufiĉe vigla,kelkfoje eĉ draste vigla.La drinkejon (Exxon Valdez) regis la granda koalicio katalun-itala,kiu vere animis restadetonen tiu agrabla angulo,foj-foje vera diboĉnesto. La alporto de franca akordionisto, laŭtvoĉa kantado de popolaj melodioj,monpeto por(finfine ne realigita) nudigo de ne! kataluno kaj aliaĵoj igis pli varmajn kelkajn momentojn ĉebufedajn.
Same eta estis la diskejo kie okazis la skandalego pro sovaĝumado de noktemuloj(troa bruigado,ĉekoridora seksumado, aĵo-difektadon ktp.). Tiu konduto kaŭzis tujan reagon fare de la mastroj de la gastejo,kiuj nin punis per monaĥa(aŭ svaba?) menuo: supo,pano kaj peco da frukto.

2. GASTRONOMIO: ISeca. Ĉu plia aldono? Jes, mi petas. Do, vivu la memzorgado.

3. KLANOJ: pli kaj pli sentiĝas la akriĝo de tiu fenomeno, kaj same kiel reprezentantoj de TEJO trafe reliefigas en internaciaj ne e-renkontiĝoj,ke homoj post debatoj kaj komunaj aranĝoj ariĝas laŭlingve, la babillingvo ĉe la malsamaj rondoj ofte ne estis esperanto.Laŭ mia percepto(ĝi ne estu realospegula) la "verda lingvo" perdas terenon kaj la klanoariĝo disvastiĝas.

4. RUBO: jen la temo de ĉi-IS. Iomege malpura,ĝena kaj forĵetebla,sed sendube aktuala pritraktindaĵo kiu estigis debatojn,prelegojn kaj lumbildprojektadojn sufiĉe partoprenatajn kaj viglajn.Mi timis,ke homoj ne tro interesiĝos pri tiu teknika afero sed la respondo de la publiko estis sufiĉe kontentiga.



5. URBO: mirinda urbo gastigis ĉi-ISon. En sudokcidenta Germanio, regiono Baden-Virtembergo,kies plej fama urbo estas Mercedes-Benza Stuttgart,troviĝas la universitata urbeto Tübingen. Multo el la ĉarmo de la malnova urbo restas hodiaŭ. Ĝia belaspekta urbo-domo nepre ravas la gaston, kiu vagante sur la centraj stratoj ĝuas per spektado de la lokaj preĝejoj domoj kaj de la percigna ornamita rivero Neckar.

6. VICO: estas ĝi la spirito kaŝa, la vera kerno de multaj e-renkontiĝoj,kaj denove perfekte plenumis sian rolon ĉefe antaŭ la silvestra bufedo. Tie oni konspiras, komplotas aŭ silente rigardas kaj precipe, ho ironia simbologio verda,oni atendadas kaj esperas la finan bongustan teleron plenvenkan.

7. VESPERA PROGRAMO: la italaj "Genepoj de Cindrulino" prezentis malpompan sed dignan kaj interesan teatraĵon,"Diskanale".
Al tiu-ĉi senrokenrola IS ne mankis Kajto,en kies koncerto ili ludis kelkajn kantojn ne tro konatajn. Miaopinie la koncerto iĝis tro longa kaj la ripozpaŭzo iomete rompis la ritmon de la prezento.
La Internacia Vespero ankaŭ estas klazika kaj deviga aranĝo en IS kaj mi agnosku,ke ĉi-foje ege plaĉis al mi. Ĝenerale temis pri mallongaj, variaj kaj kelfoje eĉ talentaj prezentoj, ekz. tiu de Mathias Funke aŭ tiu de la svisoj.
En tiu aranĝo Martin Haase,kiu kunkantis zuberoan melodion, prezentis nian landon kiel "ĉepirinean landeton provizore apartenantan al Hispanio kaj Francio".

# INTERNACIA PANORAMO

*N. Apaolaza*

Kiel mi jam rakontis en la lasta Kuspe, la situacio en Rusio pli kaj pli putras.
Subite, Jelcin atakis Ĉeĉenion, certe ke ĉeĉenoj donis kialojn, tial ke ili faris el sia patrujo rifuĝ-lokon de krimuloj, kiuj deliktis en Rusiaj kaj aliaj teritorioj; krome ĉeĉenoj estas malamataj de moskva loĝantaro kiu konsideras ilin mafiuloj. Ankaŭ la armiltrafiko estis senpuna en Ĉeĉenio.

Sed la ĉefa kaŭzo por ataki Ĉeĉenion, ne estis tiu, ankaŭ ne la intercivitana kvazaŭmilito instigita ankaŭ de Rusio. Eĉ ne la deklaro jam trijara pri sendependeco ankaŭ ne.

La vera kaŭzo estas, kiel ĉiam, fuĝo antaŭen, milite interveni kontraŭ ekstera malamiko por unuigi la popolon kaj forgesigi la internajn problemojn.

Kompreneble tio donis al Jelcin la eblon montrigi ankaŭ kiel forta ĉefo, kaj forigi kritikojn de Jirinovski kaj komunistoj.
Certe Jelcin tute eraris; la milito estis absoluta fiasko kaj ankoraŭ daŭras, kaj eble ĝi fariĝos dua Afganistano.

Dum la milito, la armeo aperis ridinda antaŭ la mondo, kaj ĝi estis uzita de kaŝaj fortoj por malfortigi kaj misfamigi Jelcin?, aŭ nur montriĝas la grandega haoso kiu regas Rusion, kaj ties armeon?

Iel ajn Rusio retroiris al cara epoko kiam ĝi estis jam duaranga potenco, kotpieda giganto. Al tio kontribuas la ekonomia krizego, la krima etoso kies paradigmo estis la murdo de TV-direktoro.

Granda danĝero estas ankaŭ la trafiko de atom-materialoj, kiuj povas fariĝi atom-bomboj mane de frenezuloj. ke tio ne estas scienc-fikcio montras la pergasaj atencoj en Japanio.

La problemo estas gravega, sed la mondo ne scias kiel reagi, kaj momente ĝi preferas daŭrigi la apogon al Jelcin. Eble tio necesas nun, sed oni devas antaŭvidi aliajn eblecojn por baldaŭa estonteco.

La ĥaoso en Rusio influis negative ankaŭ la situacion en Eksa Jugoslavio.
Nun Rusio ne emas agi kontraŭ la serboj, kiuj sentas sin pli kaj pli fortaj, kaj samtempe Islamanoj ne povas plu elteni la situacion.Sekve la milito riskas rekrudiĝi kaj Kroatio komencis kapti la okazon por rekonkeri sian teritorion.

La eŭropa Unio, al kiu denove rifuzis aliĝi Norvegio, ankaŭ transiras gravan krizon, speciale moralan kaj tre rilatan al sia nekapablo fari ion utilan en Bosnio. Sed tiu ĉi krizo havas ankaŭ ekonomian flankon: la "Mon-Sistemo estas en danĝero, kaj evidentas despli post la ampleksigo de la Unio, ke profiliĝos iu Eŭropo de du rapidecoj: norda kaj suda.

Aliflanke estas komentinda la nuna situacio en Turkio.
Unuflanke pligrandiĝanta influo de islama integrismo, kiu alportis batalon interreligian de alevioj kaj sunnioj.

Krome la ĉiama kurda problemo, kie denove estas antaŭena fugo, invadante Iraka teritorio, kie irakiaj kurdoj, batalas ankaŭ inter si. Ili ricevis aŭtonomion por esti protektitaj pri Sadam Hussein, sed ne helpas la kurdojn de Turkio.

Ĉi ĉio, kaj ankaŭ la fakto ke kurdaj deputitoj estas mort-kondamnitaj nur pro defendi ke kurdoj estas nacio montras tute klare ke Turkio ne estas vera demokratio; kaj Eŭropa Unio devus atente pristudi siajn rilatojn kun tiu lando, kiu volas aparteni al la Unio, estante sia eŭropa teritorio etega, kaj kulture tute ne estas eŭropaj.

Fortune ne ĉio estas malbona: estas ankaŭ bonaj novaĵoj, Haitio antaŭeniras bone, en Proksima Oriento la paco, inter grandaj obstakloj kaj malrapide, ankoraŭ avancas.

Ankaŭ en Irlando komenciĝis pacproceso, kaj eĉ en Eŭskio, rigardante tiujn procesojn, oni klopodas komenci kontaktojn inter politikaj fortoj por atingi la sopiratan pacon. Ĉiukaze ni ne estu tro optimismaj, ĉar poste la fiaskoj estas pli doloraj






# BABEL-EN ONDOREN (KAJ II)

Skizo de la unua parto: la bibliaj tekstoj ebligis ekde la mezepoko estigi debaton pri la perfekteco kaj antikveco de la lingvoj. La apologiistoj proponis sian propran kiel la plej puran. Jen la eŭska vico.

Urrutira jo gabe, gure Larramendik diosku euskara dugula Jainkoak berak Babelen emana, eta berriz ere Tubal dakarkigu hizpidera. Horrek eta familiakoek, penintsulako lehen biztaleek, Espainara ekarri bide zuten eta bertan hedatu. Baina, zorigaitzeko kaltez, hura mendi eta zoko hauetan bazterturik geratu zen eta beste sasi-hizkuntzak, ustelkeriaren fruituak, halabeharrez Espainian barneratu eta nagusitu ziren. Baina oroz gain, gure euskarak oraindik perfekzio gorena ezagun du, arrazoipidearen ibilkailu propioa eta hizkuntza filosofikoa dugu inon bada, bere gramatika eta trinkotasun miresgarriak ahaztu gabe, noski.

Eta zer erantsi Jusef Egiategi gure zuberotar filosofoaren hitz potolei: "*Jakintzüek dakie hüskara ama mintzoetarik dela bata, hartakoz ere Jinkoak eman zereioan obedantza* (kualitate) *güziak dütiala*". Eta egia borobil honekin asko bat ez etortzeak berari bost inporta, "*delakoz Zeiakinen* (ezjakinen) *saldoa hanitzez jakintzüena beno handiago*".

1886.ean K. Hanneman delako alemaniar batek eta Berlineko "Euskara" aldizkariaren sortzaileak, gure hizkuntza zahar-zaharra eta aspaldiko arbasoengandik datorkiguna -ezin beste aldera izan- nazioarteko mintzaira bezala enplegatzeko proposatu zuen. Jaun honen arabera, hizkuntza bizi guztien artean euskara dugu eginkizun hori hobekien bete dezakeena. Maisu kreazioa da, eta bere egiturari dohakiola, zuhaitz bat modukoa: adarrak lau haizetara zabaldu, eta bere sustraiek etengabe sustrai berriak hedatzen dituzte toki guztietara. Gainera, goxoa eta malgua da, erraz ahozkatu daiteke, eta poezia, erretorika eta filosofia adierazteko propio egina dirudi... Ikusten denez, apologetikaz denaz bezainbatean, euskaldunok ez gabiltza urri!





**ETA AZKENIK ESPERANTOA**

Baina har dezagun berriro gure haria. XIX. mende aldera hizkuntza unibertsalaren bilaketa bide berriak urratzen hasten da. Perfekzioa alde batera utzirik, nazioartekotasuna izangoda orain erizpidea, eta entseiu aprioristiko batzuk gorabehera, berandu gabe, eredu naturalista nagusituko da: alegia, diren hizkuntzetarik elementuak hartzera -lexikoa, gehienbat- eta gramatika ahalik eta gehien erraztera joko da. Nazioarteko hizkuntza laguntzaileez ari gara, noski.

Eta puntu honetara Eco-k kapitulu berezia eskaintzen dio Esperantoari "*Europako hizkuntza transnazionala* (lengua vehicular) *izateko aukera duen bakarra*". Bere "*gramatika optimizatuari*" errepaso labur bat egin ondoren, kontrako argumentu teorikoak aztertzen ditu: behin bere erabilera hedatüz gero dialektizazioaren arriskua, esaterako. Eta honi eta beste objezio batzuei ere argituko ez ditudan -ez baitizut liburua irakurtzeko gogoa uxatuko!- erantzun konplituak ematen dizkie.

Hala ere inor ez dadila engaina. Eco ez da esperantista, ikerlaria baizik; eta hain justu ikerlari bezala Esperantora hurbiltzen da, zientifiko guztiek darabilten objetibotasun berberaz, alegia. Hau lanoki aitortu behar da, eta horrela behar du izan, gainera. Berari ez baitagokio konpremezu handiagorik: bere hodar-




alea jarri eta arazoaren aintzin-gibelak zientifikoki eta argikiro eman ditu. Orain besteren txanda da.

• • •

Norbaitek pentsa lezake hizkuntza perfektuarena bilaketa antzu eta alferrikako bat besterik ez dela izan, giza ideien historian ahaztu beharreko pasadizo iluna, hatzik utzi ez duen utopia... "Oker legoke hura, baina" gogorarazten digu Eco-k. Zuzeneko ez bada, zeharkako ondorio ikaragarri baliotsuak laga baitizkigu "utopia" horrek. Besteak beste konputazioaren eta inteligentzia artifizialaren aintzindaria da: *Basic, Fortran, Hizkuntza Binarioa* eta antzeko ordenagailu-lengoaiek bide erdia urraturik aurkitu dute aspalditik datorren bilaketa "txoro" honi esker. Komeni da noizik behin atzera begiratzea kontura gaitezen ez gaudela gauden bezala *soilik* gure merituengatik; XX. mendeko zibilizazio moderno, harro eta ahalguztidunak asko zor diola aurretik hizkuntza perfektuaren bila nekagaitz entseiatu diren utopiko koadrila horri.

Umberto Eco (Alessandría, 1932) gizon grinatsua da, semiotikaren maisu eta berriztatzailea (Ikus. bere *"Tratado de semiótica general"*; Lumen, 4. argitarapena), Europako goi mailako pentsalarien artean, merezimendu osoz, toki bat bereganatu duena. Intelektual konprometitua eta kritikoa, eta -nola ez, ba!- bere ideiak azaltzeari gogotik lotzen zaiona. Eta zinez, lortzen du. Zaila da beraz *"La búsqueda de la lengua perfecta"* hau irakurriz inor hotz geratu edo aspertzea. Hortaz, jakin gainean zaude, adiskide!

**Joxemari Sarasua**

# VINILKOSMO DANCIGAS NIN

Printempo komenciĝanta nin regalis per agrabla surprizo, temas pri sopirata kompilaĵo de e-poprokkantoj. La obstina agado de tiu rokenrole freneza kaj ĉarma Flo´ finfine atingis dignan kompenson, nome, tiun-ĉi kolekton kiu supozas evidentan enantaŭan paŝon por la e-kulturo.

Vere internacia, samkiel la lingvo perkantata, moderna kiel la plejmulto da muzikaj stiloj auskulteblaj, ie ajn orgojle prezentebla kaj ĉemovade perla, tia estas laŭ mia opinio la produktaĵo.

15 grupoj trairas la bendaĵon, tien verŝante siajn zorgojn, melodiojn, vortojn, ritmojn... Ĉefas la viglaj rokenrolaj verkoj sed Jomart kaj Nataŝa au Kajto alportas valoran kvieto-kontraston, sen rompi la fadenon de la kompilo.

Kelkajn ensemblojn ni konis de antaŭe, aliaj debutas en la e-medio per kvalitaj verkoj. Tiusence mi plej ŝatis "La knabino de Sarre" de E.V., kaj tiun prezentatan de Pixamandurries, kies stilo memorigas al mi tiun de "nia" Polla Records.

Dankegon Flo´ pro cia sindediĉo, ni jam atendas la duan volumon.


*R. Blanco*.

Se vi emas al tiu-ĉi kompilaĵo, ĝi aĉeteblas (kasedo au K.D.) en la sidejo de la asocio aŭ mendeblas ĉe:

EUROKKA . FR-3145.DONNEVILLE.FRANCIO.
Tel/faks: 33-61-81-95-65.



## Venu al la 4a MELA !



>>> Atentu la datŝanĝon pro la IJS/MEJS ! <<<

| | |
|---|---|
| Kio? | MEmzorga LAg-umado proksime de Budapest. |
| Kiam? | 15a ĝis 24a de aŭgusto 1995, do tuj post la IJS/MEJS |
| Kaj antaŭe? | Nepre vizitu la IJS/MEJS, kiu okazos de la 8a ĝis 15a de aŭgusto 1995 en Tata, inter Győr kaj Budapest. |
| Kie? | 34 km sude de Budapest, ĉe la vilaĝo Délegyháza. |

Aliĝilo - sendu al: Sándor HIDEG, Halomi u. 61/B. IV/5. H-1182 Budapest

---

# Via kultura centro:

## La Internacia Esperanto-Muzeo



## Internacia Esperanto-Muzeo

**A-1010 Wien - Hofburg - Michaelerkuppel - Tel.: 535 51 45**

# Enkastela Memorplena Aventuro



# '95

# 12-19 / 07



**E. M. A. '95**

**Aliĝilo** resendenda al :

Gilles LAFITTE
102 rue Barreyre
33000 BORDEAUX
tel. 33/ 56.44.07.76

**Kastelo d' Aymare (Ajmar')**

**LE VIGAN**
**departemento LOT**
**sud-okcidenta Francio**

---

en

# MARBURGO

## Venu

al la 10a KJSO

or »ludi, krei, sperti vin mem«

## de la 17a ĝis la 23a de julio '95

Marburga Esperanto Grupo
Kaffweg 9b
D-35039 Marburg/Lahn

++49/6421/ 27889.



80-a
Universala Kongreso
de Esperanto



Tampereo, Finnlando
22-29 julio 1995